


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

ĜIRONUMERO
209354 NEDERL.

JARABONO :
NEDERLANDO :
0,80 GULDENO

ALIAJ LANDOJ :
16 Fr. Fr.; 0,70 Dol.; 2,1 Sv. Fr.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LETEROJ EL LA MALLIBEREJO.

Breslau, meze en Dec. 1917.

...Precize antaŭ unu jaro vi estis ĉe mi en Wronke kaj donacis la belan kristnaskarbon...

Tiun ĉi jaron mi mendis unu por mi, sed oni alportis tre mizeran arbeton, al kiu mankas branĉoj — nenio kompare al la pasintjara. Mi ne scias, kiel surmeti la kandeletojn, kiujn oni permesis al mi. Nun venos mia tria Kristnasko en mallibero, sed ne prenu tion tro serioze. Trankvila kaj gaja mi estas kiel ĉiam.

Hieraŭ mi longe kuŝis sen dormo — nuntempe mi neniam ekdormas antaŭ la unua horo, sed, jam je la deka mi devas en la liton — en la mallumo mi multe pripensas. Hieraŭ do mi pensis : estas fakte tre strange, ke mi vivas daŭre en ĝoja cbriceo — sen la plej eta motivo. Ekzemple mi kuŝas ĉi tie en la ĉelo sur ŝtonmalmola matraco, ĉirkaŭ mi en la konstruaĵo regas la kutima tombeja silento, estas kvazaŭ oni kuŝas en tombo; tra la fenestro falas rebrilo de lanterno, kiu lumigas dum la tuta nokto antaŭ la malliberejo. De temp' al tempo oni aŭdas nur la tre foran bruadon de trajno, kiu preteriras; aŭ, tuj sub la fenestroj la tusadon de la gardostaranto, kiu en siaj pezaj botoj faras kelkajn paŝojn por streĉi siajn kruojn. La sablo knaras tiom senespere sub liaj paŝoj, ke la tuta malpleno kaj senespere de la ekzistado eksonas el tio en la nebula, nigra nokto. Kaj mi kuŝas senmove kaj sola, dense envolvita per

la nigraj vualoj de malhelo, enuo, mallibero, vintro — kaj sub tio frapas mia koro pro nekomprenbla, nekonata interna ĝojo, kvazaŭ mi irus sub brila sunlumo tra floranta herbejo.

Kaj en la mallumo mi ridetas al la vivo, kvazaŭ mi scius miraklan sekreton, kiu punas ĉiun malbonon kaj mensogadon kaj sorĉe aliigas tion en oran brilon kaj feliĉon. Kaj serĉante la kaŭzon por tiu ĉi ĝojo, mi trovas neniun kaj ree ridetas pri mi mem.

Mi kredas, la sekreto estas la vivo mem; la profunda, nokta ombro estas ja bela kaj mola kiel veluro, se oni nur bone rigardas. Kaj ankaŭ en la knarado de l'malseka sablo sub la nerapidaj, pezaj paŝoj de l' gardostaranto sonas eta, bela vivokanto — se oni nur bone aŭskultas.

En tiaj momentoj mi pensas pri vi kaj volonte mi donus al vi ĉi tiun sorĉo-ŝlosilon, por ke ĉiam kaj en ĉiaj cirkonstancoj vi vidus la belon kaj la ĝojon de la vivo, por ke ankaŭ vi vivus en ĝoja ebrieco kaj irus kvazaŭ tra floranta herbejo.

Estas tute ne mia intenco satigi vin per imagita ĝojo. Mi permesas al vi ĉiun realan plezuron. Sed krom tio mi donus volonte al vi mian senfinan, internan ĝojon, por ke mi ne devus timi pro vi, sed povus kredi, ke vi iras tra la vivo en stelumita mantelo, kiu ŝirmas vin kontraŭ ĉio malnobla, triviala kaj timiga...

Trad. VANE.

MIA KOR' HODIAŬ FESTAS.

(Kompilo)

- | | |
|---|---|
| 1. Mia kor' hodiaŭ festas
Gajan feston de l' anim'!
Flugu ĝoje laŭta kanto
Al lazura malproksim'! | 2. Forte sonu harpaj kordoj
Pri ĉarmeco de l' natur',
Kunfandiĝu la akordoj
De feliĉo kaj plezur'! |
| 3. Mia kor' hodiaŭ festas
Majestecon de l' anim',
Pri la ĝoj' ĉiel' atestas
Kun respekto kaj estim'. | 4. Hej, la birdoj! Hej, la floroj!
Gajan rondon faru ni,
Kaj eterne kantu kanton
Pri la sankta harmoni'! |
- El : „Violetoj” (B. Giedra).

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”.

Dum la pentekostaj tagoj mi iris al belega arbarloko apud mia hejmo, en tia belega regiono, kia estas la loko de la ĉijara junularkunveno. Inter la arbustoj vagadis la cervoj, kaj supre en la branĉoj de la pli altaj arboj kantis la birdoj. En la mezo de la arbaro estis lago, kaj ĝuste en la mezo de la lago, tute ĉirkaŭita de akvo, kuŝas malgranda insulo. La homoj ne povas transiri al la insulo, sed la birdoj havas tie hejmon, kaj vivas trankvile, for de la timigaj sonoj de la homa civilizacio.

Mi iris al la bordo de la lago, kaj serĉis sidlokon, kaj ĝuste en tiu momento mi rimarkis alian viron, sidanta sur la herbo. Li ridetis al mi, kaj metante fingron al la lipoj, faris invitan geston al sia flanko. Mi zorgeme pasis al li, kaj tiam vidis la kaŭzon por lia ago. Tie, naĝante en la akvo estis familio de akvobirdoj. La du maljunaj birdoj provis montri al la gejunuloj la ĝustan metodon de kaptado de iu delikata speco de manĝaĵo. La gejunuloj provis imiti ilin kaj pli-malpli bone sukcesis. Dum kelka tempo ili lernis la lecionon kaj iomete gajnis la sciadon, poste ili malrapide fornaĝis el nia vido. Mia kunulo sin turnis al mi kaj demandis ridetante : „Nu, ĉu vi scias ion pli bonan ol tio? La infanoj lernas la lecionojn por ke ili vivu kaj kresku al fortaj birdoj.”

Kaj mi pensis pri la homaj infanoj, kiuj lernas siajn esperanto-lecionojn, por ke ili VIVU kaj kresku al mense fortaj homoj. Kiel ili povas ĝui la rezulton de bone lernitaj lecionoj, per uzado de Esperanto unue en la junularkunvenoj, poste dum la tuta vivo, kiam ili povos bonege influi la popolojn de ĉiuj nacioj al la senfina paco tra la tuta mondo.

Leighton-Buzzard (Angl.).

J. W. H.

La ebleco de esperanto.

Preskaŭ ĉiuj gravaj ideoj en la infaneco renkontas mokadon kaj ridaĉadon, sed post iom da tempo la bonaj ideoj disvastiĝas. Tiam la mokado malpliĝas, kaj oni povas observi respekton pri la vero, kiun la bonaj ideoj enhavas. Oni forigas kontraŭstaron kaj antaŭjuĝon kaj la ideoj ekfloras.

Se oni legas „Vivo de Zamenhof”, kaj la ceterajn esperantajn historiajn librojn, oni povas kompreni la dolorigan naskiĝon de la

internacia lingvo, la malrapidan disvastigon de ĝiaj ideoj, kaj la kontraŭstaron, kiun ĝi renkontis.

Nun la mondlingvo floras, plena de grandegaj eblecoj kaj esperoj. La nuna grava demando estas : „Kio estas la celo de la lingvo ? Kio estas por ni esperantistoj la plej bona maniero por propagandi la unuecon kaj povon de la lingvo inter ĉiuj esperantistoj ?” Kaj mi sugestas, ke ni devas serĉi la animon de la lingvo. Mi tre timas, ke la esperantistaro perdos la animon de la lingvo. Mi ne povas troigi la valoron de la donaco, kiun Zamenhof prezentis al la homaro. Mi imagas, ke la granda menso de nia majstro vidis la sunon sur la ĉielo. Li ankaŭ komprenis, ke la lumo estas por ĉiuj. Li antaŭvidis la venontan tempon, kiam la lumo de la internacia lingvo atingos la tutan homaron, kaj neniuj povos diri : „Mi estas fremdulo inter la homoj”. Ĉi tiu granda penso plenigis la tutan vivon de Zamenhof kaj mi volas substreki la gravecon de ĉi tiu „internacia ideo”, por kiu li tiel forte laboris. Ofte mi pensas, ke ni ne sufiĉe komprenas la realan profundecon, kiun ĉi tiu vivanta fundamenta vero enhavas. Ĉi tiu ideo de frateco estas super ĉio la lumo kaj suno, kiuj eterne povas brili sur la popoloj en la mondo. Ĝiaj varmecoj kaj vero, ĝiaj belo kaj potenco superregu la artefaritajn limojn de nacioj. Ĝi superregu ĉiajn kredojn kaj dubojn. Tiam sen koloroj, sen rasoj, sen timo kaj sen malamikeco ĉiuj povos renkontiĝi en „Neŭtralujo” por diskuti libere, ame, kaj frate la gravajn problemojn kiuj troviĝas en la mondo.

Bristol (Angl.).

E. Baggs (lernanto de S.ro Tordoff).

Pensetoj de simplulo.

Oni povas kompari la evoluan vojon de la homaro kun maro. Jen ĝi estas glata kiel vitro, jen ĝi furiozas kaj estas plena de ondomontoj kaj valoj. En la historio post trankvilaj epokoj ĉiam sekvas tumultaj periodoj.

Post la senesperigaj nigraj aktoj la kurtenoj leviĝas, kaj la sunlumo donas feliĉon kaj bonon al tiuj, kiuj kredis, ke ili marŝas en la ombroj de la morto. El la haoso naskiĝas io, kio vekas esperon, kredon kaj fidon. La preskaŭ perdita sunkanto denove estas kantata de homoj, kiuj volas konstrui la estontecon per bonaj agoj en la nuno.

Svedio.

Ede.

Kiu estas juna, estu senpacienca kaj ribela : tio estas vivo-leĝo. Kiu rigardas bildojn pri la milito, ne pensu pri feliĉo. Pensu pri la mizero, la haoso, la detruo, la malbeno de ĉio ĉi... Malamu ĝin, ĝis kiam via sango ekbolas, ĝis kiam vi ne povos ne batali kontraŭ tia terura, besta kaj nenecesa okazo, kiun oni nomas „milito”. La diplomatoj kaj militistoj luos sian ludeton, ĝis kiam la junuloj tion malebligis!!!

La cerbo de la junularo ne estas barelo, kiun oni plenigu; ĝi estas fajrujo, en kiu oni bruligu la fajron !

Ned.

N. K.

ENIGMOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8
1
2
3
4
5
6
7
8

Ciu punkto prezentas literon. La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale : 1. trairejon; 2. homon, kiu kutimas publike paroli; 3. malpliigon de prezo; 4. landanon; 5. edziĝan donacon; 6. metalon; 7. konsonanton; 8. vokalon.

L. CHASSERIAUD.

Royan (Francujo).

Ni akceptos solvojn ĝis 1 Septembro. Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.

LA SOLVO EL No 10-11.

Vera fabelo.

Foje estis bonkora viro, el kies spirito naskiĝis, kiel fratigilo inter la homoj — (dank' al ĝi ĉiu homo ne plus estas izola en sia lando kiel apro en sia arbaro) — Esperanto, vera okazo de nova ordo en la mondo. Tiel malfermiĝis nova larĝa horizonto por la homaro, kaj speciale por la universaj junuloj, kiuj venis la antaŭan jaron en Groet, kaj kies aro pligrandiĝis kaj formis T. J. O.

(Bedaŭrinde ni ricevis neniun bonan solvon!)

Nur T.J.O.-anoj rajtas partopreni la kunvenon en Tervuren !

Por komencantoj.

Kampenaj anekdotoj.

En la nederlanda provinco Overijsel, apud la Suda Maro (kiu nun nomiĝas IJsel Lago) kuŝas la urbeto Kampen. Ŝajnas, ke antaŭ multaj jaroj la loĝantoj ne estis tre inteligentaj kaj lertaj. Mi diras : Antaŭ multaj jaroj, ĉar nun la Kampenanoj estas tre saĝaj kaj prudentaj homoj. El tiu pasinta tempo mi rakontos kelkajn konatajn anekdotojn.

Iun tagon estis en Kampen terura brulo. Unu domo post la alia ekbrulis. La fajro-estingaj pumpiloj baldaŭ venis, sed ili troviĝis en tia malbona stato, ke ili tute ne povis funkcii. La loĝantoj estis tre malkontentaj pri tio kaj oni riproĉis la urbestron kaj la urb-konsilantojn pro ilia malzorgemo.

Nu, oni tuj kunvokis la konsilantojn por pli bone ordigi la aferon. Oni multe parolis kaj finfine la konsilantoj — tre saĝe! — decidis jenon : „La estingestro kaj ĉiuj estingistoj provu kaj bone ekzameni la pumpilojn kaj ĉiujn aliajn aparatojn unu tagon antaŭ ol estos brulo, posttagmeze inter la dua kaj kvara horo.

En Kampen troviĝis malnova turo kaj sur la plej alta galerio kreskis multa herbo. La konsilantaro parolis pri tio, kaj unu el la membroj proponis, ke oni kvarfoje jare hisu bovinon sur la turon, kaj ke ĝi restu tie, ĝis ĝi formanĝis ĉiun herbon.

La unuan fojon, kiam oni faros tion, multaj homoj kolektiĝis ĉirkaŭ la turo. Tion ili kompreneble volis vidi! Oni metis la ŝnuron, kiu supre iris laŭ rulbloko, ĉirkaŭ la kolon de la bovino kaj komencis hisi. Kiam la malfeliĉa besto venis apud sian novan herbejon, ĝi elpendigis la langon.

„Rigardu, rigardu!” kriis la homoj, „ĝi jam elbuŝigas la langon pro tiu bongusta herbo!”

Sed kiam vi pensas pri la ŝnuro ĉirkaŭ la kolo, vi certe komprenos, ke okazis io tute alia!

La urbo havis en tiu tempo sep pordegojn, kaj per tiuj pordegoj venis multe da mono en la urban kason, ĉar la komercistoj devis pagi mono por akiri por la premeson importi siajn varojn.

„Nu,” diris unu el la konsilantoj, „la sep pordegoj nun donas al mi sep mil guldenojn. Mi proponas duobligi la nombron da pordegoj, tiam ni ricevos dek kvar mil guldenojn!”

La venĝo.

La fama pentristo Adolf von Menzel estis tre malgranda. Iam li sidis antaŭ kafeo. Interne sidis sinjorino kun kelkaj sinjoroj. Ili ŝajne multe ridis pri von Menzel. Kviete li prenis sian skizkajeron kaj komencis desegni. De temp' al tempo li fikse rigardis la sinjorinon. Post iom da tempo unu el la sinjoroj ekstaris kaj kolere venis al la pentristo. „Sinjoro”, li diris furioze, ”la sinjorino nepre malpermesas al vi desegni ŝin !”.

Menzel ridetis, kaj montris sian skizon al la fremdulo. „Ĉu tio estas la sinjorino?” li demandis tutkviete. La sinjoro balbutis senkulpigon kaj baldaŭ la gesinjoroj foriris. — La desegnaĵo de von Menzel prezentis dikan, grasan anseron!

Kio estis Adolf von Menzel? Kia li estis? Kie li iam sidis? Ĉu li havis skizlibron? Kiuj sidis en la kafeo? Ĉu la gesinjoroj vidis von Menzel? Ĉu ili parolis kun li? Kion faris von Menzel? Al kiu li rigardis? Ĉu la sinjorino venis al li? Kiu venis al von Menzel? Kial la sinjoro venis al von Menzel? Kia estis la sinjoro? Kion faris von Menzel? Ĉu li desegnis la sinjorinon? Kion vidis la sinjoro? Ĉu la gesinjoroj restis longe en la kafeo?

La dentoj de la sultano.

Iam sultano songĝis, ke li perdis ĉiujn siajn dentojn. Tuj post kiam li vekiĝis, li vokis antaŭdiriston kaj informiĝis pri la signifo de la songo.

„Ho, estimata sinjoro”, kriis la viro, „tiu songo antaŭdiras malfeliĉon. Ĉiu perdita dento signifas la morton de parenco!”

„Fiviro!” ekkriis la sultano furioze, „Kiel vi kuraĝas diri ion tian? For vi!” kaj li ordonis ke liaj gardistoj donu al la kompatinda antaŭ-diristo cent vipobatojn.

Poste la sultano venigis alian songo-klarigiston. Ĉi tiu jam aŭdis pri la sorto de sia kolego, kaj diris :

„Ho sinjoro, kia ĝojo! Kiom da feliĉo atendas vin! Tiu songo signifas, ke vi postvivos ĉiujn viajn parencojn!”

La sultano reĝojiĝis kaj diris bonhumore : „Dankon, amiko! Iru al mia trezorgardisto, kaj diru, ke li donu al vi cent dukatojn. Tiujn vi meritis.”

Kiam la ruza antaŭdiristo eliris la palacon, li renkontis la amuzilon de la sultano, kaj tiu diris : „Via klarigo pri la songo enhavis la samon, kiel la klarigo de via kolego.”

Tiam la saĝa viro respondis : „Pripensu, malsaĝulo, ke ne gravas **kion** oni diras, sed nur **kiel** oni ion diras!”

Kion sonĝis la sultano? Kion li faris? Kial la antaŭdiristo ne plaĉis al la sultano? Kion ricevis la kompatindulo? Kiuj devis fari tion? Kion faris la sultano poste? Ĉu la dua antaŭdiristo kontentigis lin? Kiel li klarigis la sonĝon? Ĉu tio estis saĝa? Ĉu li ricevis rekompencan? Kion li diris al la amuzulo?

Tasko :

1. Kopiu kaj traduku la rakontojn en la rubriko „Por komencantoj”.
2. Laŭtlege la tutan rubrikon.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „Kampenaj anekdotoj”.

Tre simplaj ekzercoj por tiuj, kiuj nur mallonge studis esperanton.

Esperanto-leteroj.

En mia ŝranko kuŝas paketo. Tiu paketo konsistas el multaj leteroj. Kelkaj venis de instruistino en Sovetio. Ŝi rakontas pri la laboro en la lernejo. Aliaj leteroj estas el Bulgario. Jen, estas letero el Japanio, de juna kemiisto; el Svedio, de ministro, el Aŭstrio, de masonisto, el Usono, de laboristo, el Orient-Azio, de gimnazia lernanto, kaj ankoraŭ el multaj aliaj landoj.

Ankaŭ fotoj estas en la paketo kaj eĉ pli en miaj albumoj. Do, mi scias, kiel la malproksimaj geamikoj aspektas.

Kun ĉiuj mi korespondadis esperante. Domaĝe, ke en diversaj landoj Esperanto „mortis” (? red.), nome en Germanio, Aŭstrio, Ĉeĥo-Slovakio.

• Kio kuŝas en mia ŝranko? Kio estas en tiu paketo? Ĉu vi ŝatas ricevi leterojn? Ĉu vi ricevas multajn leterojn? El kiuj landoj venas miaj leteroj? Ĉu mi korespondadas nederlande? Ĉu en la paketo estas nur leteroj? Ĉu vi havas multajn fotojn? Ĉu mi scias, kiel miaj malproksimaj amikoj aspektas? Ĉu oni en ĉiuj landoj povas uzi esperanto?

La Somero.

La vetero estas tre bela. La suno estas varma, eĉ varmega. Dum tri semajnoj ne falis pluvo. La tero estas tro seka, la herbo malbone kreskas. Ankaŭ multaj aliaj kreskaĵoj ne bone kreskas pro la senpluva vetero. La infanoj iras al la akvo. Ili banas kaj naĝas. Ĉu vi povas naĝi? Tio estas agrabla sporto en la varmaj tagoj. Sed estu singarda! Ne naĝu en danĝera akvo! Ofte oni legas, ke homoj dronas dum naĝado! Do, atentu!

M. v. E.

Kia estas la vetero? Kia estas la suno? Ĉu ofte pluvas? Kia estas la tero? Ĉu tio taŭgas por la herbo? Kial la kreskaĵoj ne bone kreskas? Kien la infanoj iras? Kion ili faras? Ĉu vi povas naĝi? Kia estas la naĝado? Kia oni estu en la akvo? Kie oni ne naĝu? Pri kio oni ofte legas en la somero?

Tasko : Kopiu kaj traduku la rakontojn. Post kelkaj tagoj retraduku ilin en vian gepatran lingvon. Provu rakonti la enhavon per propraj vortoj.



komunikoj

R A P O R T O

de „Tutmonda Junular-Organizo” de la 18a de Aŭg. 1938a-30a de Junio 1939a

Pro la granda sindonemo per kiu niaj geperantoj kaj membroj dediĉis sin al sia laboro, nia malgranda organizo en mallonga tempo fariĝis firma rondo, en kiu la junularo dense kolektiĝas.

Eĉ la malluma militminaco ne povis malhelpi la evoluon de nia organizo. La verda junularo ne perdas la kredon en nia sankta idealo, sciante, ke iam la zamenhofa ideo venkos. La junaj esperantistoj antaŭpreparas sin por transpreni la belan laboron de la nuna esperantistaro, kaj konduki ĝin al efektiviĝo.

Membroj. T. J. O. nun havas 835 membrojn en 20 landoj, nome en : Anglio, Belgio, Danio, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Jugoslavio, Kanado, Latvio, Litovio, Maroko, Nederlando, Polio, Portugalio, Svedio, Svisio, Usono.

Perantoj.

En la fondkunveno de T. J. O. oni elektis landajn ĉefperantojn por Anglio, Belgio, Francio, Kimrio kaj Nederlando. Nun ni havas ĉefperantojn en la jenaj landoj :

Anglio : S.ro John W. Holland, Vandyke Road 61, Leighton Buzzard. Beds.

Belgio : F.ino D. Decavele, Tuinstraat 25, Harelbeke.

Francio : F.ino M. Montagnon, Instruistino, Alaise par Nancy sous Sainte-Anne (Doubs).

Finnlando : S.ro Kivinen, Vipurinlääi, Kouvola, Suomi.

Kimrio : F.ino Rees, Derwydd, Seven Sisters.

Latvio : F.ino Ludmila Jevsejeva, Reformatoru, 14/5, Riga.

Litovio : S.ro J. Lazaukas, Ukmerge, Taujenu m. uredija.

Portugalio : S.ro Santos Junior, Aljustrel, Alemtejo.

Svisio : S.ro Walter Kobelt, Landstrasse, St. Margrethen, St. G.

La ĉefperantoj zorgis siavice, ke en diversaj lokoj ni akiris geperantojn.

Kontakto kun aliaj organizoj.

La rilato al aliaj organizoj estas tre bona. Ĉiuflanke oni sentas la neceson de aparta junular-ligo kaj pro tio ni trovas ĉie afablan helpon kaj kunlaboron.

De I. E. L. ni ricevis proponon pri kunlaboro. La estraro tamen ne sola rajtis decidi en ĉi tio. Ni do respondis, ke ni priparolos la proponon en nia venonta ĝenerala kunveno.

Pri la kunlaboro kun la naciaj esperantistaj organizoj, oni vidu la raportojn de niaj landaj ĉefperantoj en la venonta numero de „La Perantoj inter la Perantoj”.

En la nacia kongreso de la nederlanda esperantista organizo „La Estonto Estias Nia”, T. J. O. estis reprezentata de sia prezidanto kiu salutis la kongreson.

Skribajn salutojn ni sendis al la pentekostaj kongresoj de Reĝa Belga Ligo Esperantista en Loveno, 30a Brita Esperanto-Kongreso en Weston super Maro, 10a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista kaj la 36a Nacia Franca Kongreso en Châlons-sur-Marne.

Membroj-simpatiantaj.

Ankaŭ ne-esperantistoj povas esti anoj de nia organizo, tiel mone subtenante nian laboron. Ni presigis por tiaj membroj specialajn membro-atestojn. Ili pagas minimume 40 ned. cendojn jare. Tiun ĉi monon ni destinis pligrandparte (80 %) por la enlanda propagando en tiuj landoj, en kiuj oni varbis la anojn. La restantaj 20 % estas por la ĝenerala T. J. O.-kaso. Estas nun 105 simpatiantaj membroj en Anglio, Belgio kaj Nederlando.

Propagando.

Kiel propagandorgano kaj interligilon inter la geperantoj ni eldonis stencilitan gazeton „La Peranto inter la Perantoj” redaktitan de Floor Meydam kaj Job Kars, Leerdam (Nederlando). Ni sendis ĝin senpage al nia lokaj geperantoj. Al interesigantoj ni disponigis ĝin po 5 cendoj. Ĝis nun aperis 3 numeroj. La unua en Novembro 1938a, la dua en Januaro 1939a kaj la tria en Aprilo 1939a.

De Esperantist.

Por propagandi la esperanto-junularlaboron inter ne-esperantistoj, ni intencas eldoni nacilingvaj gazetojn. Kiel provon ni presigis en Nederlando gazeton „De Esperantist”, redaktata de Job Kars. Ĝi estas kolportad-gazeto. La vendoprezo estas 5 ned. cendoj; la gekolportantoj nur pagas al ni po 2 cendoj por numero.

Korespondajoj. En ĉi tiu fako ni eldonis :

50.000 glumarkojn.

10.000 kovertojn.

4.000 leterfoliojn.

6.000 poŝtkartojn kun desegno de Jekke van Dijk.

Ni eldonis ĉi ĉion propagandcele. Pro tio ni vendis ĉion je tre malalta prezo.

Insigno. En la komenco de Januaro 1939a ni farigis 200 insignojn en la formo de la T. J. O.-emblemo. En la fino de Majo tiu ĉi stoko forvendiĝis; ni do farigos novan kvanton.

Gazetservo. De post la fondiĝo de T. J. O. ni sendis regule informojn al la esperanto-gazetaro, kiuj en preskaŭ ĉiuj gazetoj aperis. Plue niaj landaj ĉefperantoj regule prizorgis artikolojn pri T. J. O. en nacilingvaj gazetoj. Ĉiuflanke ni povis konstati la bonan efikon de nia gazetpropagando.

Radio. Ni interrilatis kun la Belga Radio Instituto N. I. R. pri radiodisaŭdigo pri nia venonta Junular-kunveno en Tervuren. La rezulto estis, ke oni intervjuos la prezidanton de la organiza komitato, S. ron Rainson pri la Internacia Junular-kunveno. Dum la kunveno oni disaŭdigos aktualaĵojn el ĝi.

T. J. O.-flago. Per lotumado ni kolektis monon por nia oficiala flago. Ĝi estas farita kaj projekta de nia estraranino F.ino Jekke van Dijk. Bastonon kun ornamo faris S.ro J. T. Kaptein. La enaŭguro okazos dum nia venonta Internacia Junular-kunveno en Tervuren.

Internacia Junular-kunveno. Niaj belgaj membroj formis organizan komitaton, prezidata de S.ron H. Rainson (Prezidanto de Flandra Ligo Esperantista). Jam anoncis sin 304 personoj el 9 landoj; plue ni atendas multajn gastojn. La kotizon por la partoprenontoj ni fiksas je 7 guldenoj. Ĉifoje envenis nur malmultaj mondonacoj por la kunveno, kompare al nia unua kongreso en Groet.

Estraro. La estraro de T. J. O ne ŝanĝiĝis; ĝi konsistas el : P. Krijt, Prez.; F. Meydam, Sekr.; M. v. d. Horst, Kasisto; E. van Veenendaal-Bouwes, Redaktorino de „La Juna Vivo”; H. J. Schut, Filmservo; F.ino Jekke van Dijk kaj W. Brant.

Estrarkunvenoj. Okazis trifoje : en Hago (la 5an de Nov. 1938a), en Amsterdam (la 18an de Dec. 1938a), kaj en Amsterdamo (la 26an de Marto 1939a).

F. MEYDAM.

Filmservo de T. J. O.

La prezentado de la filmo farita dum la unua Internacia junular-kunveno en Groet, Aŭgusto 1938, estis granda sukceso. Entute ĝi estis montrata en Ned. 26 urboj kaj vilaĝoj, kaj ĉifoje la raporto estis entuziasmaj !

Malgraŭ la multfoje prezentado la filmo estas ankoraŭ en bona stato kaj restos ĉiam multvalora memorigaĵo pri la belega kunveno en Groet.

Pri la financa parto de la filmservo ni ne povas esti malkontentaj. Novaj servoj ĉiam postulas monon ! La kaso montras profiton de fl. 31.70. Ke la filmopropagando ne estas superflua parto de T. J. O. pruviĝas per tio. La enspezoj sumiĝas fl. 193.73; la elspezoj fl. 163.02.

La T. J. O.-estraro decidis ankaŭ pri la kunveno en Tervuren fari propagandan filmon.

Kompreneble ankaŭ la Groet-filmo dume restos luebla je reduktita prezo. Kiel propagandilo por la fondado de novaj kursaj ĝi estas belega. La adreso por Nederlando estas Koedijk. Por Anglio, kie oni ankaŭ havas kopion de ĝi, S.ro W. Holland, Vandyke Road 61, Leighton Buzzard.

Kopioj de la nova filmo estos aĉeteblaj po proksimume 50 nederlandaj guldenoj. Kolektu la bezonatan sumon ! Lu-donante ĝin por malalta luprezpo post kelkaj monatoj la filmo fakte pagas sin mem !

H. J. SCHUT.

(Baldaŭ ni ankaŭ enpresigos raporton pri la angla filmservo.)

„LA PACA BATALANTO”. Ĉi tiu nova gazeto pri esperantismo kaj internacia politiko aperos en aŭgusto aŭ sept. Petu senpagan prospekton de S.ro J. Ensink, Laarderweg 149, Hilversum (Nederlando). (La red. varme rekomendas ĉi tiun novan gazeton.)

Financa raporto de T. J. O. de 16-8-1938 ĝis 30-6-1939.

Enspezoj :		Elspezoj :	
Kotizoj	Hfl. 269.93	Abonoj „L. J. V.”	Hfl. 126.80
Simpatiantoj	40.46	Administracio	112.25½
Donacoj	104.77½	Estrarkunvenoj	30.46
La Peranto	8.—	Membroatestoj	24.62
De Eperantist	35.89	Simpatiantoj	15.14
Vendaĵoj	134.14	La Peranto	38.12
Filmservo	2.—	De Esperantist	35.89
Por „La Juna Vivo”	4.15	Kliŝoj	2.38
Tervueren	245.85	Filmservo	56.—
		Vendaĵoj	153.68
		Por „La Juna Vivo”	4.15
		Tervueren	245.85
		Kassaldo je 30-6-'39	4.85
	<hr/>		<hr/>
	Hfl. 850.19½		Hfl. 850.19½

Kelkaj klarigoj :

Ĉar multaj T. J. O.-anoj ankoraŭ uzas la adreson de „L. P. V.” por sendi monon, kaj „L. J. V.” kompreneble nur sendas al ni la kotizon post depreno de la abonkosto, la enspezoj de kotizoj kaj la elspezoj de abonoj pro tio ŝajnas iom malaltaj. Ni tamen enspezis por proksimume 700 anoj la kotizon.

En la kostoj por Administracio estas enkalkulitaj ĉiuj korespondelspezoj, la ceteraj por administrataj elspezoj kaj la ne-apartigeblaj propagandelspezoj.

La mono por Tervuren postulas apartan administradon pri kio siatempe aperos aparta raporto.

Bilanco :

Kassaldo	Hfl. 4.85	Suldoj	Hfl. —
Provizoj :		Posedaĵoj entute	75.69
Aĵoj por La Peranto	6.50		
Vendaĵoj	46.44		
Membroatestoj	17.90		
	<hr/>		<hr/>
	Hfl. 75.69		Hfl. 75.69

M. v. d. HORST, Kasisto.

Donaco : J. W. H. en Leighton-Buzzard (Angl.) : 9,10 guld.

T. J. O.-semajnfinoj en Nederlando : La 15-an kaj 16-an de julio T. J. O. aranĝos semajnfinojn ĉe la „Reeuwijkse Plassen”, apud Gouda. La programo estas tre alloga (muziko, kantado, parolado, teatraĵeto, kampfajro). La dimanĉon oni povas pasigi laŭplaĉe (remi, naĝi, ludi). La partopreno kostas nur 40 cendojn.

De 1-2 julio „La Kampfloroj” kaj kelkaj aliaj T. J. O.-anoj, entute 30 personoj, semajnfinojn en Limmen. Estis belegaj, neforgeseblaj tagoj.

Flagoj : La grupoj el West-Graafdiijk, Koedijk, Groet, Rotterdam kaj Gouda kunportos flagojn al Tervuren. Espereble ankaŭ eksterlandaj grupoj helpos ornamati la salonon per belaj tukoj.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

TERVUREN (7-14 aŭg.).

Jam anoncis sin pli ol 300 partoprenontoj. Krome multaj plenkreskuloj deziras viziti Tervuren por rigardi la unikan spektaklon : Tiom da junuloj el diversaj landoj, parolantaj unu lingvon.

Bezonaĵoj : 1. Katuna dormsako, kaj unu dika aŭ du maldikaj lankovriloj. Faru el ili kovrilsakon. El Anglio oni petis ĉu ni povas zorgi pri kovriloj, ĉar estas malfacile kunpreni ilin. Ili pretas pagi luon. Ni posedas 110 maldikajn kovrilojn. Ĉiu junulo pagas nur unu ŝilingon kiel luprezon por du kovriloj. Oni baldaŭ skribu ! — 2. Solidaj vestoj. Estas tre konsilinde kunprenu trikvoston. — 3. Fortikaj ŝuoj. — 4. Tualetartikloj (i. a. lavtukoj, ŝapo, ktp.). — 5. Banvesto. — 6. Malgranda kaliko. — 7. (Precipe por la gvidantoj) : Foto-aparaton. — 8. La holandaj kaj belgaj junuloj kunprenu sakon por pajlo kun kusenkovrilo. — 9. Ĉiu kunportu tranĉilon kun forko.

Ne forgesu viajn muzikinstrumentojn kaj kantarojn !

Enlitiĝo : Je la 10-a. Ellitiĝo : je la 7-a horo. Neniu rajtas paroli inter la deka vespere kaj la sepa matene, por ke ĉiu bone ripozu.

Pagoj : La organiza komitato urĝe petas, ke ĉiu pagu sian kotizon antaŭ la 1-a de aŭgusto. Kiuj venos aŭtobuse pagu ankaŭ tiun sumon. La komitato ja mendis la aŭtobusojn kaj respondecas pri la mono.

Vojaĝo : Por Nederlando ni luis 3 aŭtobusojn. Ili forveturos je la sesa horo matene el Groet, Koedijk kaj West-Grafdijk.

La angla karavano alvenos la 7-an de aŭgusto proksimume je la sepa horo en Tervuren. La holanda aŭtobuskaravano alvenos je la sesa horo.

Tre grava : La gvidantoj, kiuj venas kun grupo, tute respondecas pri sia propra grupo.

Biciklantoj kaj vagonar-vojaĝantoj povos veni en Tervuren laŭplaĉe!

PROGRAMO DE LA INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO EN TERVUREN, BELGUJO (7-14 aŭg.).

7 aŭg. : Alveno de la partoprenontoj, interkonatiĝo, salutparolado de la prezidanto. Enlitiĝo je la 10a horo.

8 aŭg. : Matene je la 10a horo oficiala akceptado en la urbdomo. Promenadoj en arbaro kaj parkoj, naĝado, ludado, kantado, ktp.

Vespere : Inaŭguro de la T.J.O.-flago. Parolado de Adalbert Schwingshaki, aŭstra esperantisto. Lumbildoj pri Bruselo kaj Ardenoj. La kimraj infanoj ludos teatraĵeton : „La belega salono”. Kantado de kirmraj kaj esperantaj kantoj.

9 aŭg. : Vizito al Bruselo.

Vespere : Sino Jahn parolos pri Bulgario. Si kantos kaj mandolinludos. La infanoj el Bishop Auckland (Anglujo) kaj West-Grafdijk (Nederlando) ludos teatraĵetojn. Dancado. Komuna kantado.

10 aŭg. : Grandaj promenadoj en arbaro kaj parkoj. Naĝkonkursoj sub gvidado de spertulo.

Vespere : Oficiala festvespero en la teatra salono. Internacia programo. Kunlaboros verŝajne esperantistoj el : Anglio, Skotlando, Kimrio, Nederlando, Belgio, Francio, Germanio, Hungario, Bulgario.

11 aŭg. : Libera promenado en la ĉirkaŭaĵo.

Vespere : La T. J. O.-filmo pri la kunveno en Groet. La Frisoj (Ned.) montros : „Skotse Trye” (Skota Trio) kun la intermetita figuro : „Suis-teto”, danco en frisaj naciaj kostumoj. „Rapida Esperanto-Instituto”, komedieto, verkita de S.ro S. S. de Jong.

12 aŭg. : Granda ekskurso al Dinant, Ardenoj kaj Givet en Francio.

13 aŭg. : Libera mateno. Kunveno en la arbaro aŭ la parko. Komuna kantado. Kantado de Marcel kaj Edinée Montagnon. Teatraĵeto de la infanoj el West-Grafdijk.

14 aŭg. : Adiaŭo kaj foriro.

Kvina listo da partoprenontoj :

Nederlandaj junulinoj : 148. Rika Leegwater (13), West-Grafdijk; 149. Roos Schoonderwoerd, Utrechtse Veer 4, Leiden; 150. Jacoba den Uyl, Iste Atjestr. 10¹¹¹, Amsterdam-O; 151. Trynie Klomp (12), 152. Riet Klomp (12), 153. Marie Zwetsman (13), 154. Grietje Dol (11), ĉiuj en Koedijk (N.H.); 155. Geertje Feenstra, Huizum (Fr.); 156. Annie Kuperus, Leeuwarden; 157. Klazina Holtrop, Leeuwarden; 158. Boukje v. d. Goet, Huizum; 159. Klaske Halbesma, Huizum; 160. Anneke Jorna, Roordahuizum; 161. Sjoukje Baarda, Blessum; 162. Jetje Kuperus, Berlikum; 163. F.ino Seilberger, Siondwardsstr. 16, Rotterdam; 164. F.ino L. Spits, Antoniuslaan 43, Blerik; 165. A. Barsingerhorn, 166. Jannie Egmond, ambaŭ en Koedijk; 167. Ma P. Kamp, Regentenstr. 46, Schagen; 168. F.ino R. J. Rienks, Marssum; gvidantoj: 169-170. Geedzoj v. d. Ent, Lange Welle 53, Rotterdam-Z.; 171. F.ino R. Jeclof en Middelburg; 172. S.ino Luyting-Vos v. Zon, Zd. Scharwoude.

Nederlandaj junuloj : 173. Jan Voogt, Oranjegracht 45, Leiden; 174. Jo Cremer, Levendaal 170a, Leiden; 175. Jaap Muis, 176. Jaap Butter, 177. Henk Otto, 178. Gerrit Schaak, 179. Wim Otto, 180. Jacob Beets, 181. Rein Koorn, 182. Piet Coevert, 183. Arie Barsingerhorn, 184. Piet Slooten, 185. Simon Damiaans, 186. Kees Barsingerhorn, 187. Kees Stuffens, gvidanto S.ro Schut (188), ĉiuj en Koedijk (N.H.); 189. Hoekstra, Giekerk; 190. K. Schoustra, Leeuwarden; 191. Arjen Pietjou, Leeuwarden; 192. Lieuwe Herrema, Hallumerhoek; 193. Hans Luyting, Zd. Scharwoude.

Anglaj junulinoj : El la lernejo « The Mount » en Bishop Auckland : 194. Kathleen Bainbridge, 195. Peggy Byers, 196. Muriel Foster, 197. Doris Tefels, 198. Dorothy Peacock, 199. Brenda Pickering; 200. Zita Pickering, 201. Margaret Wilkinson; 203. Mary Winifred Appleby; 204. Gladys Isabel Robson; 205. F.ino Jessie Taylor, 116 Sturgess Avenue, London N. W. 4.

Anglaj junuloj : El Lymington Senior Boys' School, Dagenham (Essex) : 206. Robert John Burt (13); 207. Kenneth H. Edwards (13); 208. Frank Fletcher (13); 209. John Anderson Kelly (13); 210. Douglas Francis Kemp (13); 211. Roy William Mash (12); 212. Alan James Mash (12); 213. Ernest

Owen Mills (13); 214. Leonard Martin Pekar (12); 215. Clifford Percival (12); 216. Leslie Arthur Perriman (14); 217. Francis Sanders (12); 218. Ernest Stewart (12); 219. Dennis Peter Treweek (13); Gvidantoj : 220. S.ro F. J. May, Lymington S. B. School; 221. S.ro H. G. Toms (sama adr.); 222. S.ro H. A. Wulson, 32 Downing Rd.; 223. S.ro G. Taylor, 15 Runham Road, Hemel Hempstead; 224. Jack Thomas Taylor (12-j., sama adreso); 225. Anthony Henry Joseph (10-j.) Newton Str. 45, London S. W. 11.

Jen la grupo el Robert Gordon's College, Aberdeen, Skotlando : 226. Charles John Murray Burnett; 227. George Ogilvie Clark; 228. William John Gavin Cowie; 229. Alexander Forbes; 230. Cambell Victor Fraser; 231. Harold Gordon; 232. Charles Buchon Milne ;233. Ian Park; 234. Stewart Alexander Ross; 235. Robert Still; 236. Cecil Taylor.

Germana junuloj : 238. W. Brade, Nordhausen am Harz.

Belgujo : 239. S.ro H. Rainson, Hombeeksche stw. 54, Mechelen; 240. F.ino D. Decavele, Harelbeke; plue venos verŝajne grupo el la geinstruista lernejo en Blankenberge.

Postvenintaj partoprenontoj : Nederlando : 241. F.ino C. v. Oord, Schermerhorn (N.H.); 242. Trynie Kos, Schagen (N.H.); verŝajne venos kelkaj junuloj el Zd. Scharwoude (N.H.); 243-244. Geedzoj Blom-Tindal, Rotterdam; 245. Annie Beets, Spykerboor (N.H.); 246. G. Klinkhamer, West-Grafdijk (N.H.); 247. R. Schiploff, Wier (Frislando); 248. J. W. Rodenhuis, Leeuwarden; 249. Gerbrand Timmerman, Petten (N.H.); plue anoncis sin grupo da junuloj el Leigh-on-Sea, Essex, Anglio; 250-252. Gvidantoj de la grupo el Aberdeen : Henry Dobbins, Emil Leutz, S.ino Julia E. Thompson.

Financa raporto :

Restadkostoĵ : J. K. en Leerdam : f 4; A. K. en Bergen : f 3,50; F.ino G. en Leiden : f 10,50; Fam. K. en Amsterdam : f 10,50; v. V. en Rotterdam : f 10; D. H. en Giekerk : f 3,50; S. en Leeuwarden : f 3,50; A. P. en Leeuwarden : f 3,50; G. F. en Huizum : f 3,50; A. K. en Leeuwarden : f 7,00; K. H. en Leeuwarden : f 3,50; B. v. d. G. en Huizum : f 3,50; K. H. en Huizum : f 3,50; E. B. N. kaj K. B. en Wirdum : f 14; B. T. en Rotterdam : f 7,00; A. J. en Roordahuizum : f 3,50; L. H. en Hallumerhoek : f 5,50; J. v. D. en Rauwerd : f 3,50; R. J. en Middelburg : f 3,50; J. v. d. M. en Sneek : f 7,00; G. H. en Sneek : f 7,00; T. de G. en Leeuwarden : f 3,50; G. P. en Balk : f 7,00; J. K. en Leerdam : f 3,00; v. H. en Rotterdam : f 7,00; L. S. en Blerik : f 7,50; F.ino K. en Berlikum : f 3,50; P. J. U. en Haarlem : 3,50; v. d. E. en Rotterdam; f 14,00; v. d. H. en Rotterdam : f 7,00; S.ro S. en Koedijk : f 63.

Vojaĝkostoĵ : G. F. en Huizum : f 2,00; A. K. en Leeuwarden : f 4,00; K. H. Leeuwarden : f 2; B. v. d. G. en Huizum : f 2; K. H. en Huizum : f 2; J. v. d. M. en Sneek : f 4; F.ino H. en Sneek : f 4; T. de G. en Leeuwarden : f 2; S.ro S. en Koedijk : 32; Fam. v. V. en Limmen : f 16.

Lastaj sciigoj : Jam anoncis sin 350 partoprenontoj por Tervuren. Multajn nomojn mi ne plus povas enpresigi; ankaŭ la financa raporto ne estas komplota. Post kelkaj tagoj mi forsendos cirkuleron al la ned. partoprenontoj rilate al la pasporto, forirtempo de la aŭtobusoj el diversaj lokoj.

Ciu infano kunportu buterpanojn por la unua tago.



KORESPONDADRESOJ

Ciu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Anglujo : Por Verdstela Semajno en Lymington S. B. School, Dagenham, Essex, 24-28 Julio, sendu, ni petas, leterojn, poŝtkartojn, ktp. al Clifford Percival aŭ H. G. Toms.

Francujo : S.ro C. Raspail, Lacalm, Aveyron, dez. kor. kun samideanoj en ĉ. l. pri sociaj k. kulturtemoj, politika situacio, interŝ. pm.

Nederlando : H. Althof, van Gemmenichstr. 22, Franeker (Fr.), dez. kor. kun ĉiuj landoj. Ne interŝanĝas poŝtmarkojn. Respondo certa.

Nederlando : 20-jara S.ro dez. kor. kun geamikoj en ĉiuj landoj, kaj interŝ. poŝtm. Gerrit Schoen, Noorderpad 67, Z. O. Beemster, P. Purmerend.

Nederlando : D. Visser, 28-jara laboristo, Bozum (Fr.), dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interŝ il. poŝtkartojn. Certe respondos.

Portugalujo : S.ro A. Dias Abrantes, dez. korespondi. Uun respondo certigita. Adr. : Estrada de Malpique 19, Lisbono.

Francujo : S.ro Vereecke André, 25-jara, rue J. Guesde 5, Eure par Fenain (Nord), deziras korespondi, kun ĉ. l. pri ĉiuj temoj.

Francujo : S.ro Espinasse Clotaire, 19-jara, Allée C., No 11, de Sessevalle-Somain, Nord, dez. kor. kun ĉ. l. pri ĉ. l.

Nederlando : G. Timmerman Jr, Dorpsstraat M 31, Petten, dez. kor. kaj interŝ. pm. kun finnlandan(in)o. Li estas 18-j. lernant-komunum-oficisto.

ANONCETOJ.

BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK, A. G. J. v. Straaten. Ampleksa, tolbindita libro, Esp.-Ned.—Ned.-Esp. Klara preso. Prezo nur f 2.25. Mendebila al „La Juna Vivo”.

LA PLEJ TAŬGA KAJ MALKARA LEGAJO troviĝas en la binitaj jarkoletoj de „La Juna Vivo”. Belaspektaj libroj, konvenaj por ĉiuj esperantistoj. Prezo nur po 35 cendoj plus afranko. Nur estas akireblaj la jarkoletoj de 1934/135, '35/'36, '36/'37.

KIAL vendiĝis en mallonge tempo 5000 ekzempleroj de nia „Internacia Lernolibreto” ?

Car la libreto montriĝis taŭga, kaj ĉar la prezo estis tre malalta!

Nun aperis la 2-a eldono de la „Juna Vivo”-Internacia lernolibreto. La malgravaj mankoj, kiu estis en la unua eldono, nun forestas, kaj la aspekto de la libreto estas multe pli bela.

La prezo tamen restis la sama (po 20 cendoj, 4 fr. fr., 0,15 dol., plus afranko. Ĉe mendo de multaj ekzempleroj rabato!).